

La tre okupita araneo

Eric Carle



Libere tradukita de Nikola
kaj Martin Markarian

Iun sunan tagon araneo estis portita tra la aeron per leĝera vento. Silka fadeneto
akompanis ĝin dum la flugo. Tiam ĝi atingis barilon ĉe la rando de farmbieno.



... kaj ĝi komencis teksi reton.



« Heeeeee ! » henis cêvalo.

« Cû vi volas veni iom rajdi sur mia dorso ? »



Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.



« Muu, muu ! » muğis bovino.
« Ću vi volas manĝi herbon kun mi? »




Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.



« Be-e-e ! Be-e-e ! » beis šafo.

“Ĉu vi volas veni saltadi kun mi sur la kampo? »




Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.




« Mek, mek » blekis kapro.
“Ĉu vi volas veni grimpadi kun mi? »




Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.



« Grunt, grunt » diris porko.
Ĉu vi volas veni ruliĝi en ŝlimo kun mi? »




Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.



« Ŭaf, ŭaf » bojis hundo.
Ĉu vi volas postkuri la katon kun mi? »




Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.




« Mjaŭ, mjaŭ » mjaŭis kato.
« Ĉu ni dormetu iomete en ombro? »



Sed la araneo ne respondis.
Ĝi estis multe tro okupita farante sian reton.



« Kvak, kvak » diris anaso.
“Ĉu vi volas veni naĝi kun mi?”



Sed la araneo ne respondis.
Ĝi nun finfaris sian reton.




« Kokeriko ! » kriis la koko.
“Êu ni kune kaptu tiun ĝenan muŝon ? »



Kaj tion faris la araneo.

Ĝi kaptis la muŝon en la mezo de sia reto.



« Uhu, uhu »
miris la strigo.
« Kiu faris tiom
belan reton ? »
Sed la araneo
ne respondis.

Ĝi jam dormis,
ĉar antaŭe ĝi ja
estis dum la
tuta tago tiom
okupita.



